n-ro 61

julio 1998

## Ĉu la IKEF-anoncoj utilas ?

Jam de pluraj jaroj La Merkato aperigas etajn komercajn anoncojn por membroj kaj por ne-membroj. Ĉar apenaŭ alvenas reagoj ĉe IKEF pri utilo aŭ malutilo de tiaj anoncoj, mi ĵus alskribis kelkdekajn komercistojn por kiuj IKEF aperigis anonceton dum la pasintaj jaroj; mi nun atendas la respondojn. Ankaŭ IKEF-membroj kiuj reagis al tia anonco bonvolu informi min pri la rezultoj.

## Novaj membroj...

...kiuj aliĝas nun, meze de la jaro, bonvolu pagi kotizon por 18 monatoj, ĝis fino de 1999 (900 aŭ 600 BEF, laŭ landokategorio).

RR

## Enhavo


Universala Kongreso - Laborplano 1998-2000 . . . . . . . . . . . . . . 3-4
Kunlaboro IKEF-TAKE . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 5
Diversaĵoj: nova peranto, Tempus, Kvartaga Marŝo Nijmegen,
Eurovoc, ITRE - novaj membroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 6
Komercaj petoj kaj proponoj - Projekto 'Profesia Reto' . . . . . . . . . 7
IKEF en Interreto - Zagrebaj foiroj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 8

**La Merkato** (LM) estas organo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La **Identecŝildaro** - iam dujara eldono - ne plu aperas. Anstataŭ ĝi, membroj povas aperigi siajn personajn informojn en La Merkato. Ĉiujare ili ricevas kompletan membroliston.

La **Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; D-ro István Gether, S-ro François-Xavier Gilbert; D-ro Marco Picasso; S-ro Seikô Yamasaki; S-ro Daniel König.

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**:

Ĉe s-ro Frans Josef Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono + fakso: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)agoranet.be.

Atentu ! Parto de La Merkato estas sendata tra Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen. Tio estas nur sendadreso; korespondaĵoj senditaj al tiu adreso ja alvenas, sed kun prokrasto. Prefere uzu unu el la supraj adresoj.

---

IKEF-informoj en Interreto: http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/ikef.htm

---

**La jara membreca kotizo** estas 600 belgaj frankoj (BEF) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") (aŭ egalvaloro: 30 NLG, 30 DEM, 20 USD) kaj 400 BEF por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj") (20 NLG, 20 DEM aŭ 14 USD). Kiu aliĝas meze de la jaro, pagu por 18 monatoj (900 aŭ 600 BEF).

Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membreca kotizo.

**Kontoj**: - Ĉe UEA kaj FEL: kodo ikef-c
- belga poŝtĉekkonto (Bruselo): numero 000-1592629-83

Ankaŭ eblas pagi per internaciaj respondkuponoj (1 IRK = 34 belgaj frankoj). La IRK estu stampitaj de la eldonanta poŝtoficejo. Eŭroĉekoj (en belgaj frankoj, kun kartonumero dorse) sendotaj al Roland ROTSAERT eblas, sed eksmodiĝas.

**Perantoj**:

*Belgio*: Flandra Esperanto-Ligo (FEL), Frankrijklei 140, B-2000 ANTWERPEN

*Ĉeĥio*: S-ro Vladislav HASALA, A. Dvořaka 1, CZ-696 62 STRAŽNICE

*Cinio*: S-ro **WANG Tianyi**, Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, rete komerco(a)public.xa.sn.cn



*Francio*: S-ro François-Xavier **GILBERT**, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy)

*Germanio*: S-ro Franz Josef **BRAUN**, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)

*Hungario*: D-ro István **GETHER**, Palóc u. I, H-1135 Budapest XIII

*Italio*: D-ro Marco **PICASSO**, via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

*Japanio*: S-ro **YAMASAKI** Seikô, J-185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12; retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2200 enoj)

**IKEF-aranĝoj dum la 83-a UK en Montpeliero**

1. Ĝenerala Kunveno

Nia ĉi-jara Ĝenerala Kunveno okazos dum la 83a UK en Montpeliero je merkredo 5 aŭgusto 1998, horo 13.00-14.30 h., en salono Hodler. Ĉiuj membroj kaj interesitoj estas invitataj partopreni. Jen la tagordo:

1. Raporto de la Prezidanto pri la agado de IKEF dum la jaro 1997
2. Financa Raporto de la Financa Konsilanto por la jaro 1997
3. Decido pri la uzo de la financa profito de 20.539 BEF
4. Elektoj de la estraro
5. Diskuto kaj akcepto de la Laborplano 1998-2000 (vidu sube)
6. Transiro al eŭro por librotenado ekde 1999
7. Diversaĵoj

Koncerne tagorderon 1-3 ni atentigas pri la skribitaj raportoj en La Merkato n-ro 60.
Koncerne tagorderon 4: La oficperiodo de estraranoj Braun (Prezidanto), König kaj d-ro Picasso finiĝos. Braun denove kandidatiĝas, König kaj Picasso ne. Necesas la elekto de anstataŭantoj por König kaj Picasso. Ĝis fine de majo anoncis sin nur unu kandidato, nome d-ro Rainer Kurz, Stuttgart, Germanio. Eble dum la Ĝenerala Kunveno pliaj kandidatoj prezentiĝos.

2. Vizito al la Komerca Ĉambro de Montpeliero

Tia vizito por IKEF-membroj kaj interesitoj estas planita por ĵaŭdo, 6 aŭgusto 1998. Preciza horo kaj detaloj pri alveturo estos anoncitaj dum la Ĝenerala Kunveno je la antaŭtago. En la Komerca Ĉambro ni ekscios multon pri la ekonomia situacio de la regiono de Montpeliero kaj entute pri suda Francio. Krome per tiu vizito ni volas demonstri al la Komerca Ĉambro la bonan funkciadon de nia lingvo ankaŭ en komercaj aferoj.

Por la Estraro: Franz Josef BRAUN, Prezidanto

**Laborplano 1998-2000**

En mia novjara saluto en La Merkato n-ro 59 de januaro 1998, p. 3, mi jam atentigis pri la "Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo" de UEA. En ĉi tiu kampanjo ĉiuj fakaj asocioj aliĝintaj al aŭ kunlaborantaj kun UEA estas invititaj al kunordigita agado.

La estraro de IKEF intertempe ellaboris Laborplanon 1998-2000, kiun



ni prezentas al vi sur la sekva paĝo. Temas pri estrara propono, do malneto. Ĝin ni volas pridiskuti kun vi kaj poste definitive akceptigi de la ĉeestontaj membroj. Do bonvolu jam nun prepari vin al tio kaj pripensi eblajn amendojn pridiskutendajn sub tagordero 5.

Post akcepto de la laborplano, tiu estu la bazo por nia agado en la venontaj 30 monatoj. Por ne disipi niajn fortojn sed koncentri nin al celtrafa agado, tiam la membroj bonvolu elekti por sia agado erojn el la laborplano.

Franz Josef BRAUN, Prezidanto

IKEF-LABORPLANO 1998-2000
kadre de UEA-Kampanjo 2000 por internacia lingva ordo

| cif. UEA | speco de agado | responsulo ↓ | prioritato↓ |
|---|---|---|---|
| 1.4.1 | Kampanjo "por pli vasta verdujo" | | |
| | Pligrandigi la membraron de IKEF | | |
| | a) Difino de celgrupoj varbotaj | estraro | 1 |
| | Ĉiuj homoj, kies profesio aŭ pangajna laboro | | |
| | rilatas al komerco, ekonomio kaj ekonomiko | | |
| | b) Difino de membronombro atinginda | estraro | 1 |
| | 200 membroj ĝis fino de 2000 | | |
| | - moto: Ĉiu membro varbu novan membron | ĉiuj m. | 1 |
| | - sendigi varbleteron tra UEA al ĉiuj UEA- | | |
| | membroj , kies profesio rilatas al nia fako | prez. FJB | 1 |
| | c) Krei argumentaron por "vendi" IKEF al siaj | | |
| | celgrupoj; establi laborgrupon por tio | prez. FJB | 2 |
| 1.4.2 | Celtrafaj IKEF-aj agadoj | | |
| | a) Okazigi vizitojn dum UK-semajnoj ĉe lokaj | prez. FJB | 1 |
| | entreprenoj kaj/aŭ ekonomiaj institutoj | | |
| | b) Okazigi similajn vizitojn dum aliaj | koncerna- | 2 |
| | Esperanto-aranĝoj, kondiĉe ke almenaŭ tri IKEF- | taj mem- | |
| | membroj ĉeestas la aranĝon | broj | |
| | c) Havigi reklamanoncon de entreprenoj al E- | ĉiuj mem- | 1 |
| | gazetoj | broj | |
| | d) Instigi kaj subteni negocon inter E-istaj | ĉiuj mem- | 1 |
| | komercistoj | broj | |
| | e) Terminara laboro | Yamasaki | 1 |
| | f) Verki fakajn artikolojn en E-gazetoj | membroj k. | |
| | | ĵurna- | 1 |
| | | lisma ta- | |
| | | lento | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 2.1.1 | Disvastigo de informoj pri E-o, UEA kaj IKEF<br>a) Regule ĝisdatigi kaj ampleksigi la IKEF-ajn informpaĝojn en TTT<br>b) Plibonigo/plirapidigo de la komunikado inter membroj per uzo de retpoŝto<br>c) Produkti nian IKEF-informilon E-lingvan ankaŭ en la plej gravaj naciaj lingvoj; krome tiaj tekstoj aperu in interreto<br>d) Post ricevo de la plej bonaj informiloj nun ekzistantaj kaj tradukeblaj el naciaj lingvoj, kiujn la UEA-estraro elektos, ni kunhelpos al traduko kaj disvastigo (nur de tiuj kiuj iom rilatas al nia fako) | B. Holm<br><br>ĉiuj mem-broj<br><br>redaktoro RR<br><br>Yamasaki S. | 1<br><br>1<br><br>2<br><br>3 |
| 3.5 | Kontaktoj kun ekstermovadaj instancoj, kies aktivecoj rilatas al la celoj de IKEF<br>a) Komisiono de EU - Ekonomia Direkcio<br>b) Naciaj ministerioj pri ekonomio<br>c) Ekonomia fakultato de universitatoj kaj ko-mercaj altlernejoj<br><br>d) Komercaj Ĉambroj | M. Cwik<br>prez. FJB<br>sciencis-toj pri ekonomio<br>membroj kun kon-taktoj al K.Ĉ. | 2<br>3<br>2<br><br>2 |

**Kunlaboro de IKEF kun TAKE - LA DOMO**

Laŭ UEA-jarlibro 1997, p. 64, TAKE (Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj) estas faka asocio kies celo estas "arigi ĉiujn esperantistojn, fakulojn pri konstruado kaj promocii Esperanton en la ekonomia mondo". Estas komisionoj pri terminologio, reklamado, komerco de produktoj kaj profesia trejnado.

La memelektitaj taskoj de TAKE - LA DOMO (LA DOMO estas ĝia organo aperanta kvarfoje jare) parte kongruas kun tiuj de IKEF. Tial okazis je propono de TAKE - LA DOMO komuna estrarkunsido kun IKEF kun la celo kunordigi taskojn kaj fari laŭeble komunajn agadojn. Tiu konsido okazis je 29 aprilo 1998 en Verdun, Francio. Jen la komuna protokolo pri tio:

Kunsido de la estraroj de IKEF kaj TAKE - LA DOMO en Verdun (Francio)

La kunveno okazis la 26-an de aprilo en ĉeesto de s-roj Braun, Gilbert kaj Rotsaert (IKEF) kaj s-roj Grossmann kaj Ludwig (TAKE - LA DOMO).

Estis komparataj la strukturoj de ambaŭ asocioj kun preskaŭ samnombra membraro. IKEF estas ĉefe financata per membro-kotizoj; la informilon La Merkato ricevas ĉiu membro sen pliaj kostoj. TAKE - LA DOMO (al la ekstera mondo la asocio sin



prezentas kiel TAKE - ESPERANTO) ankaŭ estas financata de la membro-kotizoj, sed plie ricevis donacojn kaj vendas siajn eldonaĵojn (faklibrojn).

La agadsfero de IKEF koncernas komercon, ekonomion kaj ekonomikon. Tiuj agadsferoj ankaŭ koncernas TAKE - LA DOMO. Komence la ideo estis arigo de konstruistoj esperantistaj, sed iom post iom la estraro konsciiĝis, ke nepas arigi sub la tegmento de LA DOMO kaj promocii fakasociojn plej diversajn cele al nova ĝis nun tro neglektita apliko de Esperanto: Esperanto en la profesia vivo.

Ĝis nun diferencas la asocioj en tio: IKEF agadas iom pli en teorio, TAKE en praktiko, laŭ oportuno pricela.

La unuaj decidoj pri estonta kunlaboro jenas:

1. En julio 1998 ambaŭ asocioj reciproke dissendos sian organon La Merkato kaj LA DOMO ankaŭ al membroj de la alia asocio. La dissendo okazos en komuna koverto.

2. Ambaŭ asocioj funkciigos komunan budon/standon dum la 83-a UK en Montpellier.

3. La estraroj planas komunajn fakajn seminariojn por siaj membroj.

Poste la estraroj de ambaŭ asocioj observos la evoluon kaj decidos pri aliaj paŝoj al iom-post-ioma pli vasta kunlaborado. La principo estu:

Neniu konkurencado, sed kunlaborado

F.J. BRAUN - E. LUDWIG

Sekve de tio, ĉiu IKEF-membro ricevas ĉi-monate kun La Merkato n-ro 61 la organon de TAKE, la revuon LA DOMO. Inverse ĉiu membro de TAKE ricevas La Merkaton de IKEF. Dum la UK en Montpeliero ambaŭ asocioj funkciigos komunan standon. Pluaj paŝoj de komuna agado estos poste priparolataj.

Por la Estraro: Franz Josef BRAUN, Prezidanto

**Nova peranto: Flandra Esperanto-Ligo (FEL)**

Ĉar ne venis reagoj al la propono en LM 59, p. 3, FEL ekde nun estas IKEF-peranto belga kaj internacia.

**Tempus**

La Tempus-Phare kaj Tempus-Tacis programoj de la Eŭropa Unio subtenas kunlaboron inter altlernejoj por forigi la mankon de fakaj specialistoj en orienta Eŭropo, eksa Sovetio kaj Mongolio. Gvidilo pri la programoj haveblas ĉe Eŭropa Trejnada Fondaĵo, Villa Gualino, Viale

Settimio Severo 65, I-10133 TORINO, Italio; fakso (39) 116 30 22 00, retpoŝto info(a)etf.it, TTT www.etf.it. En la TTT-paĝoj ankaŭ troviĝas detalaj informoj pri ETF.

**Kvartaga marŝo en Nijmegen (Nederlando): ankaŭ por komerco !**

La kvartaga julia marŝo kun starto kaj alveno en historia nederlanda urbo Nijmegen ekzistas ekde 1909. En 1999 la regiona Komerca Ĉambro dum la marŝo organizos Internacian Komercan Renkontiĝon inter regionaj kaj internaciaj vizitantaj aferistoj. Ne nur sporte sed ankaŭ komerce Nijmegen valoras. Ĉu vi deziras personan inviton por la sekvonta jaro ? Tiam bv. sendi viajn datumojn al s-ro Kees RUIG, Ĉambro de Komerco por Centra Gelderlando, P.F. 9292, NL-6800 KZ ARNHEM, telefakso +31-24-3790506, rete int.trade(a)arnhem.kvk.nl.

**Eurovoc CD-ROM: utila EU-terminaro ?**

Laŭ la anonco Eurovoc estas multlingva 'thesaurus' (vortaro) kun kontrolita kaj strukturita enhavo, kiu kovras ĉiujn aspektojn de la eŭropa aktiveco. La ĵus aperinta tria eldono estas farita laŭ internacie akceptitaj normoj. Ĉar Eurovoc povus esti interesa por la terminologia laboro de IKEF, mi petis kaj ricevis pli da informoj, sed ili ne multe utilis; oni devus 'vidi' la produkton. Ĉu hazarde iu el niaj legantoj konas ĝin ?
Kat.: J X-04-97-783-1F-Z. Prezo: 200 ekuoj.

RR

**Internacia TradukReto** (http://perso.wanadoo.fr/dan.cdm/kio.htm)

Ĉar kelkaj el vi informis min, ke ili ne povas legi la framajn TTT-paĝojn ("Netscape"), mi rearanĝis la paĝojn de ITRE, nun legeblaj de ĉiuj. Bonvolu konsulti ilin kaj reagi, por ke mi ĝisdatigu ilin kaj korektu la erarojn.

Daniel DURAND, ITRE

**Novaj membroj**

257. S-ro Germain PIRLOT, Steenbakkerstraat 21, B-8400 OOSTENDE, Belgio (dumviva!)
258. S-ro Stano MARČEK - Esperantisto Slovaka, Zvolenská 15, SK-036 01 MARTIN, Slovakio
259. S-ro Altaf Gohar Khan - Algohar Business Systems, Suite 5, 4th Floor, Ginza Centre, Blue Area, ISLAMABAD, Pakistano; telefono 0092 51 273243.

**Nova adreso**: 195. S-ro Ottmar Jareb, Teckstr. 8c, D-71116 GÄRTRINGEN

**Komercaj petoj kaj proponoj**



**Angolo**

Firmao V.S. serĉas partnerojn por kunlaboro, en regiono Angolo-Kongo, pri: aera kaj mara transporto, industria fiŝado, minaĵoj, petrolo kruda (ekspluato, servoj), agrikulturo, importo/eksporto. S-ro J.C. Tukifimpa-Nsoko, C.P. 399, Luanda, fakso 244 2 397731.

**Brazilo**

Energia Equipamentos Eletronicos, Rua Dr. Zeferino Motta 171, BR-30525-170 BELO HORIZONTE - MG (S-ro Helio Nonato de Oliveira) produktas diversajn elektrajn aparatojn. Konsultu retpaĝojn (en portugala) je http://www.energia.ind.br; rete helio(a)digitus.com.br.

**Irano** (kompletigo de informo aperinta en LM60)

S-ro Alireza Tehrani, dogan-peranto, No. 39, Agagia 1 street, Sajadshahr, Mashad 91876, tel. (009851) 786158, fakso (009851) 59123, 53044 (nerekta) preparas k eksportas manĝaĵojn kaj meblaron (precipe al centra Azio). Ankaŭ kapablas liveri aktualajn informojn pri irana komerco, dogano kaj turismo. Kontakto prefere per fakso aŭ letero.

**Rumanio**

S-ro Constantin MARCU (Str. Zizinului 65 D 2, RO 2200 BRASOV, telefono/fakso +40-68-312043) havas entreprenon por demeti zinkon sur diversaj ŝtalaj pecoj. Li ankaŭ kapablas ligi kontaktojn kun diversaj instancoj kaj entreprenoj.

**Ukrainio**

Min interesas aĉeto de nemoveblaĵoj kun ebleco por la aĉetanto ricevi oficialan rajton loĝi en tiu lando. Krome, estas serĉataj variantoj pri komuna investado de perspektivaj projektoj kun eŭropaj firmaoj au komercaj organizaĵoj. Mi ofertas borilojn por bori graniton kaj aliajn durajn materialojn. Mikaelo LINECKIJ, p.k. 140, UA-254201 KIEV 201, <urso(a)espero.freenet.kiev.ua>.

**Progreso de la projekto 'Profesia Reto' (LM58-59)**

Malrapide ĉi-tiu projekto disvolviĝas. La sinproponoj ere envenis ĝis antaŭ monato. Ĉar ne plu aperis sinanoncoj kaj ĉar nun mia okupiteco permesas tion, mi ordigis la kandidatojn. Envenis 20 reagoj el: Bjelorusio, Bosnio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Jugoslavio, Litovio, Malagasio, Nederlando, Norvegio, Rumanio, Rusio, Ukrainio kaj Uzbekistano.

Ne ĉiuj reagoj estis kompletaj. Mi nun komencis kompletigi la

datumojn. Poste mi kontrolos la datumojn kaj kvalitojn, ĉar ne de ĉiuj mi estas certa, ĉu ili vere povas plenumi la profesiajn bezonojn. Mi difinos tarifojn kaj faros aranĝojn. Post tio listo por internacia uzo devos esti farata. Kompetentuloj povas ankoraŭ anonci sin, sed estu certaj pri siaj kapabloj, ĉar alie la efiko, demonstrante amatorismon, domaĝos al la Esperanto-movado.

Kees RUIG
Groesbeekseweg 53, NL-6581 BJ MALDEN <int.trade(a)arnhem.kvk.nl>

**IKEF en Interreto**

La oficiala retpaĝo de IKEF estas: http://www.freeyellow.com/members3/ikef/. De tiu paĝo estas ligo al la ceteraj paĝoj, kiuj momente daŭre estas lokigitaj ĉe mia ISP. En la pasinta numero de LA MERKATO estis publikigita mia oferto pri senpagaj retpaĝoj al IKEF-membroj. La unua, kiu reagis estis s-ro Bing Vang el Ĉinio. Vi povas vidi lian tute freŝan paĝon sur la jena adreso: http://www.freeyellow.com/members4/ikef-0202/. La dua estis s-ro Rob Ebenau (.../IKEF-0063/) Tiuj paĝoj estas modeloj de la ofertitaj senpagaj paĝoj. Ankaŭ VI povas havi VIAN SENPAGAN PAĜON! Kontaktu min e-poŝte. (IDEO! Vi povas proponi al esperantistoj aliĝi al IKEF kaj havi senpagan retpaĝon! - Ĉu ne estus bona varb-ideo por IKEF?)

SERVO al IKEF-anoj!

Sur la oficiala paĝo de IKEF vi povas aliĝi al e-poŝt-listo je la nomo "ikef-merkato" ĉe www.onelist.com. Mi iniciatis la liston, sed nun ĝi estas je libera dispono de IKEF-anoj. La listo donas al ni eblecon komuniki unu kun la aliajn - senpage, rapide kaj efike! Mi ankaŭ komencis novan paĝon ĉe mia ISP je la nomo: IKEF-SERVOJ sur la jena adreso: http://www2.dk-online.dk/users/teamholm/ikefserv.htm. Sur tiu paĝo mi donos klarigojn pri plej oftaj demandoj (FAQ) kaj pri administrado de viaj IKEF-paĝoj. Mi ŝatus aŭdi vian sinceran opinion!

Bent Holm <service(a)teamholm.dk>

**Zagrebo: Printempaj Foiroj**

Zagreba foirejo kiel kutime ankaŭ ĉi printempe gastigis plurajn specialajn foirojn. Meze de aprilo tie okazis 46-a Internacia Vastkonsuma Foiro, 40-a Internacia Meti-Foiro, 38-a Internacia Foiro pri Nutrado, 17-a Internacia Foiro pri la Pakuma Teĥnologio, 22-a Internacia Foiro pri Konstruado kaj 2-a Internacia Infanfoiro.

Estas menciinde, ke la Internacia Infanfoiro havis du partojn: krom komercan ankaŭ nekomercan kie la infanoj povis ludi, desegni, k.s. En tiu parto prezentiĝis ankaŭ E-o fare de Kroata Esperantista Unuiĝo. Estis prezentita internacia ekspozicio pri popolkostumoj, estis



organizita infandesegnejo ĉe kiu oni kolektis la desegnaĵojn por TEJO-konkurso kaj E-ludejo. Krome estis prezentitaj E-eldonaĵoj por infanoj.

Komence de majo okazis Internacia Turisma Foiro kaj Internacia Vino-Foiro. Ĉe la turisma foiro prezentiĝis pluraj en- kaj eksterlandaj turismaj agentejoj kiuj krom siaj servoj prezentis unuopajn landojn per belegaj prospektoj. Ĉe la vina foiro la vizitantoj havis eblecon gustumi la eksponaĵojn.

Marija Beloŝeviĉ <mbelosev(a)public.srce.hr>

**Eŭropaj gvidlinioj pri financa administrado**

Komuniko, aprobita de la Eŭropa Komisiono je 22 februaro 1998, haveblas tra Interreto je http://europa.eu.int/dg15 en PDF-formato (ĉ. 330 Kb). Kvankam laŭ informilo (Eŭropo sen Limoj, marto 1998) la teksto ekzistas en ĉiuj lingvoj de la EU, mi nur sukcesis lokigi francan, anglan kaj eble germanan version. RR